FAMILIA VIVO.

Mencinda malofta fakto estas ke gesinjoroj Jan JACOBS-VANDERSTEGEN el Antwerpen, Belgujo, fariĝis en la monato novembre "jubileanaj geedzoj". Sinjorino Jacobs fariĝis esperantistino en novembro 1909 kaj lia edzo en 1907. Depost pli ol 50 jaroj aktive partoprenas en la esparanta movado.

Jan Jacobs festos la 2an de januaro 1960 la 75an datreveno de sia naskiĝo. Li estas eksprofesoro pri modernaj lingvoj kaj konata lingvisto. En 1909 li akiris la ateston pri profesora kapableco de Esperanto de Belga Ligo Esperantista. Depost tiam li gvidis multajn kursojn pri Esperanto en sia urbo kaj en aliaj lokoj, i.a. en Valencia (Hispanujo). Multnombraj estas liaj paroladoj en kaj pri Esperanto en Belgujo, Nederlando, Danlando, Cekoslovakujo, Hispanujo, Kanariaj Insuloj (Las Palmas). Li estis help-organizinto de la 7a U.K. en Antwerpen (1911). De 1911 ĝis 1922 li estis la sekretario dekasisto de Internacia Asocio de Instruistoj, fondita de la ĉeĥa pioniro Th. Cejka, kaj redaktora -administranto de Internacia Pedagogia Revuo. Li kreis la rolon de "Modredo" en "Ginevra" de Dro E. Privat (9a U.K.-Bern 1913). Li akiris la 4an premion en la Ia Oratora Konkurso (9a U.K.-Bern 1913). In 1913 li direktis publikan koncerton de kantoj en Esperanto. Li sukcesis atingi ke la Urbestraro de Antwerpen organizis oficialajn publikajn kursojn pri Esperanto. Li verkis en kunlaboro kun gekolegoj kurson pri Espernato per korespondado, bazitan sur la listo de la 876 plej uzatajvortoj de H. Danneil. Li estas prezidinto de diversaj grupoj esperantistaj kaj ankoraŭ nun prezidanto de Antwerpen'a Poresperanto Propaganda Komitato. Li estas la Ia vicprezidanto de "World Federation for the Protection of Animals" (Mondfederacio por Bestprotektado) dum kies estrarkunvenoj kaj kongresoj li uzas Esperanton.